# El liberecana vidpunkto

1
2008/9


- Pri kia krizo ni parolas?
- Kaŭkazio kaj Okcidento
- Inmigrado
- Chomsky pri la ĵurnalaro
- 11S: kio reale okazis?
- Maroko, ĉu demokratio?





## Ĉu krizo?

Esperantigitaj elĉerpaĵoj el liberecanaj gazetoj

Frontartikolo

# Ĉu krizo...? Kian krizon ni priparolas?

**La plej ripetita vorto dum la lastaj monatoj estas tiu de "krizo". Ĉiuj parolas pri ĝi, sed la demando, kiun ni devas starigi estas "Pri kia krizo ni parolas aŭ ili parolas al ni?". Ĉar la laborista klaso jam antaŭ multaj jaroj suferadas la ekonomian kaj prilaboran krizon.**

La hispana ekonomio kreskis nome dum la la lasta jardeko per jara meznombro supera ol 3% el la Malneta Enlanda Produktado (MEP). Dum la sama periodo la entreprenistaj profitoj obliĝis je la 73%. La modelo pri "hispana kreskado" dum tiu ĉi jardeko, sekvanta la gvidliniojn de la ekonomia tutmondiĝo, sinbazas sur ecoj facile vidigeblaj ĉe la sektoroj pritaksataj plej "agemaj": 1) la prinemoveblaĵa sektoro (la briko en porloĝa konstruaĵo kaj la publika konstruado per grandaj infrastrukturoj kiel aŭtovojoj kaj rapidtrajnoj), 2) la turisma kaj priservada sektoro, 3) la financista sektoro baziĝinta sur la virtuala kapitalmovo kaj la spekulacio pri grundoj, krudaĵoj kaj armiloj, kiu metis egajn kvantojn da mono je dispono de la spekulaciistoj, 4) la ekspluatado de la enmigrintoj, 5) la predado de la medio, 6) la fleksebligo de la laborkondiĉoj kaj 7) la malmuntado de la publikaj servoj, ĉio tio enkadrita en 8) registara politiko, stimuliganta la konsumemon kaj la avidon pri privata proprieto.

La grandaj entreprenoj de la *Ibex 35*[a] ĉe tiu kazino nomiĝinta Borso movas ĉiujare ĝis unu biliono ($10^{12}$) da eŭroj, tiom kiom la tuta MEP de la hispana ŝtato. La mono ŝanĝas de manoj, oni espekulacias per fikciaj valoroj kaj aktivoj kaj oni akiras grandajn profitojn por entreprenoj, akciuloj kaj senhontaj spekulaciistoj. Tiuj ĉi samaj entreprenoj enpoŝigas al siaj akciuloj ĉirkaŭ 450.000 milionojn da eŭroj dum la lasta jardeko.

Tiuj samaj entreprenoj kaj homoj nun parolantaj pri la krizo, tiuj samaj klopodantaj plenan aplikon de la kapitalisma sistemo kaj de la teorioj pri libera merkato, postulas nun, ke oni per publika mono kovru la egajn truojn, kiujn ili mem okazigis ĉe la tutmonda ekonomio per ekstrema ekspluatado de la homoj kaj la rimedoj.

Kiam tio bone funkciis, la "hispana modelo" estis aklamata kiel rezulto de la streĉo kaj la moderneco por situigi nin inter la plej "riĉaj kaj povohavaj" landoj. Neniu dubigis la bazojn, sur kiuj ĝi kreskis kaj sur kiu estis starigitaj la grandaj entreprenistaj profitoj. Tiujn nin, kiuj ĉiam kritikis tiun modelon, oni taksis kiel pesimistojn, viziulojn aŭ defetistojn.

Tutmondskale neeltenebla, maljusta kaj malegaleca kreskiga modelo kaj kiu ĉe la hispana ŝtato atencas kontraŭ la socia justo, ĉar ĝi prezentas tiun realon:

- Preskaŭ triono el la hispanaj familioj estas mileŭristaj[b].
- La salajroj suferas senĉesan perdon el akirkapablo.
- La enspezoj de la 20% el la plej riĉa loĝantaro jam estas 5,1-oblaj ol la enspezoj de la 20% el la plej malriĉa loĝantaro.
- La hispana loĝantaro taksita malriĉa estas la 20%.
- La malaltaj salajroj kaj la malstabilo

a Ibex 35: Índice Bursátil Español indeX (Hispana Borsa Indekso)

b Kiuj survivas per enspezo ne surpasanta la mil eŭrojn ĉiumonate.

ĉe la dungo klarigas, ke la loĝantaro de malaltaj enspezoj pligrandiĝis per pli rapida takto ol tiu de la mezaj enspezoj.

- La hispana ŝtato estas iu el la plej malegalecaj laŭ la enspezoj de siaj sociaj klasoj.

Tiun situacion ili nomis "kreskado, bonstato, miraklo, ktp", kiam la realo estis jam aŭtentika krizo por granda parto de la socio kaj aparte notinde por la laborista klaso.

Je la nuna momento, ni devas noti, ke la senlaboreco kalkulas jam 11,5% kaj la nedaŭreco ne subiris el la 33%. La Konsumpreza Indico (KPI) altiĝis ĝis la 5,5, dum la salajroj daŭrigas sian perdon de akirkapablo. La MEP malaltiĝas sub la 1% kaj oni planas kreskigi la produktadon koste de subprezigi la maldungaĵojn kaj kunsenti novan prilaboran reformon, kiu aliigos al senvaloraĵo la rajtojn de la kolektivaj kontraktoj.

Aliflanke la fiska politiko, celanta favori la kapitalon per malaltigo de la impostoj al la grandaj riĉaĵoj kaj limigojn al la entreprenistaj kotizadoj, finas per politiko pri privatigo kaj malmuntado de la publikaj servoj, kiujn pagas ni ĉiuj.

La kapitalo, la registaroj, la entreprenistaro kaj la plimultaj sindikatoj pretendas, ke "ilian krizon" pagu tiuj samaj je ĉiam: la gelaboristoj –friponitaj de la prilaboraj reformoj kaj la neelteneblaj konsumpolitikoj, kiuj malaperigis tion publikan kaj la garantiojn pri rajtoj por ĉiuj.

Ni ne rajtas nescii, ke tiu procezo, malriĉiganta la plejmunton, firmigas la kapitalisman tutmondiĝon el aŭtoritara, subpremanta kaj militema socikonceptadoj kaj stimuligas tiel la kreskadon de la priarmilan negocon kiel la senbremsan spekulaciadon sur la energio kaj la agrokulturo –ili kapablas kondamni dekojn da milionoj da homoj al la malsato ĉe la tuta mondo. Tiun malantaŭirigan ĝeneralan procezon ni suferas aparte ĉe la EU, kie ni ĉeestas kontraŭdemokratian altrudprocezon de pakto/konstitucio ree kaj ree rifuzita per balotado.

Altrudo kunaganta kun aliaj mezuroj, kiuj kune kun la asignata memstareco de la Centra Eŭropa Banko konsistigas la ĝermon de aŭtentika ekonomia diktatorado. Ni parolcelas la Lisbonan Pakton, alsubskribita de la plimulta sindikatismo por altrudi la laboran flekseblon kaj la liberan maldungon; la Bolkenstein-an gvidlinion, altrudinta al ni la malmuntadon de la publikaj servoj; la hontigan gvidlinion pri la reiron de la enmigrintoj, limiganta movojn kaj rajtojn de la enmigrintuloj, kiam ili jam ne utilas kiel malmultekosta laborforto, praviganta la perforton de la civilaj rajtoj al milionoj da gelaboristoj; kaj la plej novan gvidlinion pri la 65 horoj de labora deĵoro, kiu longigas ĝin kaj taksas kiel devon la salajratan laboron dum tiom da tempo kiom la entreprenisto decidu, malebliganta la socian vivon de la homoj.

Fronte al tiu altrudo ni bezonas kulturon de la kontraŭstaro al konsumismo, al la kreskado pro la kreskado. Ni bezonas surstratiĝi por bremsi tiun maŝinon de maljustecoj kaj malegalecoj nomiĝanta merkata ekonomio kaj konstrui socion, respektanta la medion, la indan laboron, la tempon de kolektiva vivo de la homoj, ligita al la produktado de sociaj havaĵoj sufiĉaj por ĉiuj.

Ni bezonas intensigi la konfliktojn kaj skui la konsciencojn. Ni bezonas kolektive lerni administri la rimedojn kaj la satigon de la bezonaĵoj de ĉiuj. Ni bezonas, ke la ĉefroleco kaj la administrado de la vivo estu akceptata koopere. Ni bezonas konkeri la realan rajtegalecon por ĉiuj. Kaj ni bezonas que tio estu esprimata ĉestrate, ĉegazete, ĉefabrike...

Ni bezonas movilizi nin ĉe nia ĉiutageco kaj iradi ĉiuj kune al ĝenerala striko.

**Kaŭkazio: Kialoj de la konflikto, centriganta la ĵurnalaran someron**

# Kiuj estas la bonuloj?

## *David Karbala*

La malmultan tempon, kiun la ĵurnalaro ne dediĉis aplaŭdi la hispanajn naciajn teamojn ĉe Pekino, ĝi dediĉis plejparte paroli pri la Kaŭkazia krizo. Ni komencos per objektivaj faktoj: Suda Osetio, kiu ekde la 1992a travivas faktan sendependon, suferas militan intervenon fare de Kartvelio kaj tiam Rusio kontestas per amasa atako tiel ĉe Suda Osetio kiel ĉe aliaj partoj de Kartvelio. Ĉi-momente la *internacia komunumo* –t.e. Usono kaj ties aliancanoj– denoncas la rusan intervenon kaj postulas ties returniron. Tuj post interveno de la franca prezidente Sarkozy Rusio kaj Karvelio subskribas pakton, ŝajne ne plenumiĝanta. Tamen, por kompreni la situacion, nepras noti tiel la regionan historion kiel la rolantajn internaciajn interesojn.

### Rusio: el iu al alia imperio

Kiam la stalina burokrataro disfaligis tion restanta el la revolucio, rekonstruinte malnovan imperion sub la nomo de USSR, Kaŭkazio estis iu el la plej suferantaj regionoj. Jardekoj poste, kun la disfalo de la USSR je la 1991a, la naciaj streĉoj kaj la postuloj pri memdetemino fariĝis iuj el la ĉefaj konflikteroj.

Multaj el la respublikoj elspruĉintaj el la fino de la USSR estis neniam etne homogenaj. La longaj rusigantaj jardekoj kaj la devigaj migradoj sub Stalino plifortigis tiun staton kaj lasis rusan loĝantaron en ĉiuj el ili. Progresema kaj demokrata politiko flanke de la sendependaj ŝtatoj povus esti solvinta la situacion sen troajn problemojn, sed la novaj regantuloj decidis alviciĝi al okcidento kaj aldone al la novliberalaj tezoj. La kondiĉoj rezultaj de la frapkuracado ne estis la plej taŭgaj por kontrui nacian kunvivadon aŭ superi la malnovajn disdividojn, tiel ili lasis malfermitan pordon por ke Rusio profitis la malkontenton de la naciaj malplimultoj por premigi ene de la perditaj teritorioj.

Fakte la rusa argumento pri tio, ke ĝi batalas por defendi la naciajn rajtojn de






Suda Osetio aŭ de Abĥazio, havas malmultan fundamenton. La rusa parlamento agnoskas tiujn respublikojn kiel sendependajn, dume la ĉeĉenoj –kiuj laŭteorie havas la samajn rajtojn al sendependo– suferis teruran militon kaŭze de la agado de la rusa armeo. Sekve oni devas kompreni la rusan intervenon kiel respondon al la interesoj de la rusa reganta klaso.



Kartveliaj soldatoj ĉe Suda Osetio

### La okcidenta hipokriteco

Samtempe multaj civitanoj eble restus gapintaj, kiam ili vidis, ke tiuj invadintaj Irakon nun denoncas Rusion kaŭze de atako al suverena lando. Nu, nepras memorigi, ke la NATO partoprenas la kulpon pri la nuna konflikto okazanta ĉe Kaŭkazio. Post dispecigi la eksan Jugoslavion –pli ĝuse stimuligante direktatan sendependon de Kosovo–, oni rajtas taksi hipokritan, ke nun la okcidentaj gvidantoj insistas sur la "teritoria integreco de Kartvelio" kaj neas la memdeterminan rajton al Suda Osetio. Eĉ la BBC agnoskas, ke nek la gvidantoj nek la sudosetia popolo deziras esti parto de Kartvelio.

Je la ĵus pasinta aprilo la NATO kunsentis ĉe Bucareŝto la eniron en la alianco de Kartvelio. La nepra kondiĉo estas, ke Kartvelio *solvu* la konflikojn de Suda Osetio kaj Abĥazio. Tiu ĉi povus esti klarigo pri kial Kartvelio agas nun post 16 jaroj el konflikto.

Fakte la ampleksigo de la NATO estas ero de la usona projekto plifortigi ĝian militistan povon ĉe la tuta mondo kaj apartenas al la sama strategio ol la milito ĉe la Meza Oriento kaj la plano pri kontraŭraketaj ŝirmoj ĉe la Orienta Eŭropo, ricevinta impulson mem dum la Kaŭkazia krizo per paktosubskribo de Usono kaj Polio.

Tial la nuna krizo remalfermis la fendojn, aperintaj je la 2003a okaze de la invado al Irako. Usono estas ekonomie malfortiĝinta, flanko, kiun la nova krizo nur plimalbonigis kaj kiu kaŭzis pliigon de la konkuremperdo rilate de aliaj ŝtatoj. Fakte la EUa ekonomio superas tiun usonan je pli de 20%.

Kie Usono eltenas amasan avantaĝon estas ĉe la militista kampo. Tial la armiloj –aŭ almenaŭ la minaco de la armiloj– prezentas ĝian plej bonan veton por elteni la povon. Aldone la petroleo kaj la gazo de Kaŭkazio estas grava ero de la konflikto. Ĉio partoprenas grandan ludon el geopolitikaj interesoj.

La angla registaro decidis antaŭ multaj jaroj, ke ĝiaj interesoj estas pli bone sekurigataj per elteno de tre forta alianco kun Usono, kio klarigas ĝian senkondiĉan apogon al la Bush-a strategio.

Francio kaj Germanio kontraŭe ne partoprenas tiun ĉi opinion. Malgraŭ tio, ili havas neniun malfacilaĵon partopreni la usonajn militojn, kiel ĉe Afganio, kaj eĉ gvidas la okcidentajn minacojn, kiel faras Francio kontraŭ Hizbulaho ĉe Libano. Fakte ili ne estas kontraŭmilitistaj, kiel montras la tutmonda listo pri militistaj elspezoj, kie Francio estas tria en la vico kaj Germanio sesa. Tamen Francio kaj

Germanio havas proprajn interesojn, kiujn ili pretas defendi kaj ne estas nepre favorataj de la usona plifortiĝo.

Nun ekzemple ili havas neniun intereson defii Rusion, kiu ne nur estas grava prienergia provizanto sed ankaŭ ekonomia partnero. Tial ili bremsas la usonajn klopodojn malbonigi la konflikton kun Rusio kaj ili eble evitos la ampleksigo de la NATO sur Kaŭkazio. Se Kartvelio estus



jam aliancano, teorie ĉiuj partneroj –inkluzive de la hispana ŝtato– devus esti sendintaj trupojn por defendi ĝin kontraŭ Rusio. Fakto, kiu ekde la platformo *Ni haltu la militon* oni montras kiel ekzemplon por stimuligi la eliron el la NATO.

La Kaŭkazia krizo montris, ke Usono ne estas ĉiopova –kiel iuj kredis– kaj ke Rusio daŭrigas esti grava potenco.

La ŝanĝo je la fortorilatoj ĉe la mondo okazigos sekvojn dum multe da tempo. Antaŭ tio, kiun perspektivon prenas la agemuloj ĉe Katalunujo?

### Ne al la milito, ne al la intervenoj

Devus esti memkomprenebla, ke la respondon de la socia movado devus malsimili al tiu, kiun deziras la regantoj: simple kondamni Rusion kaj forgesi ĉian respondecon de Okcidento. La kartvela registaro, fidela aliancano de Usono, komencis la militon dum subpremis demontrojn pro la demokratio je la pasinta novembro ĉe Tbiliso.

La socia movado ankaŭ devas ne favori Putin-on. Samkiel la okcidentaj intervenoj lia ago kaŝas la interesojn de la rusaj regantoj. Fakte oni scias, ke la gvidantoj de Suda Osetio estas koruptaj kaj aŭtoritatemaj. La alternativaj sektoroj devus veti pro eltenado de strategio malebliganta reiron al la malvarma milito.

# Corbacho kaj la enmigrado

## *Pep Juárez*

La deklaroj de la hispana Ministro pri Laboro kaj Enmigrado, Celestino Corbacho [Korbaĉo], per kiu sciigis la neniigadon de la ĉeorigina dungado de la enmigranta laborforto kiel mezuron por halti la senbridan pliiĝon de la senlaboreco, ne estas la unuaj, kiujn ili faras rilate al la enmigrado (memoru, inter aliaj, tiuj pri “ni de devas regi nin laŭ la normoj de la






lasta alveninta”, ktp). Ŝajnas, ke la ministro ne povas tragorĝi la enmigrintojn. Sed tiuj laste publikigitaj intencoj devigas nin minimume fari iujn meditaĵojn.

Unue, nenio surprizinda en tio, ke la nursolan aplaŭdon, kiun ricevis Corbacho ĉi-rilate, devenis el la Populara Partio (PP). Ankoraŭ pli: la mesaĝo de la ministro almenaŭ subsojle tro apudiĝas al la ksenofobia demagogio, ornamanta la faŝistan propagandon (“ili venas rabi la laborpostenojn al ni”, “la hispanoj unue”, ktp). Kontentigas la PP-on, kiu dumjare obstinis identigi enmigradon kaj deliktadon, ke nun aperas Corbacho ligante la ĉeoriginan dungadon (bombasta mezuro de la Zapatera registaro rilate al enmigrado) kaj la senlaborecon.

Due, la ĉeorigina dungado kaj la prikvota politiko estis fakte pli porbilda kampanjo (inkluzive de fotografaĵoj kun la enmigrintoj) ol efikaj mezuroj rilate al enmigrado. Dum la lasta jaro tiuj dungadoj estis malpli ol la 10% (ĉirkaŭ 85.000 el entute preskaŭ unu miliono) el eksterlandaj laboristoj, enirantaj (laŭleĝe aŭ kaŝe) hispanan teritorion. Tamen, se ili malaperas, la ebloj laŭleĝigi la laboran rilaton de la enmigruloj malpliiĝas ĝis nulo. Nun, tiuj enirantaj sen kontrakto, eĉ laŭleĝe, ne povas reguligi sian laboran rilaton. Se ni aldonas al tio la ekstreman staton de tiuj, kiuj malhavas permeson pri laborado kaj loĝado (kvankam ili laboras kaŝe), ni ne surprizos per tio, ke la ega puto el malstabilo, labora ekspluatado kaj subtera ekonomio kreskas senĉese.

La ĉeorigina dungado estas nenia garantio kontraŭ la trouzo. Sufiĉu la ekzemplo de tiuj 25 senegalaj laboristoj, kiujn dungis ĉeorigine la entrepreno *Acciona Facility Services* kaj kiuj deĵoras ĉe *Acciona Airport Services* ĉe la flughaveno de *Son Sant Joan* de Majorko ekde la pasinta 16a de majo. Tiuj kamaradoj faris en Senegalio trejnajn kursojn pri “elektromeĥanika bontenado” aldone al selektada proceduro flanke de la *Acciona Korporacia Universitato* (oni supozas, ke per publika subvencio). Kiam ili alvenis Majorkon, la akirita trejnado utilis por nenio, ĉar ĉiuj deĵoris kiel peonoj (valizportantoj) kaj post du monatoj kaj duono, fine de julio, estis devigataj modifi sian ĉeorigine paktitan kontrakton (40 horoj semajne dum unu jaro) al alia por nur 24 horoj semajne. Kun la sekva malpliigo de salajro, perforto de iliaj rajtoj kaj malplenumo de tio paktita en Dakaro.

Estas notinde, ke tiuj laboristoj kun la subteno de la *Senegala Societo en Majorko* kaj de la *Ĝenerala Konfederacio de la Laboro* denoncis sian situacion antaŭ la tribunaloj, krom interparoli kun reprezentantoj de la centra kaj aŭtonomeca registaroj kaj la diplomatia reprezento de Senegalo en Hispanio. Estos videnda, ĉu la politikistoj adoptas mezurojn kontraŭ *Acciona* (kiu aldone kompromisis subvencii la vojaĝon al Hispanio kaj tion ne plenumis) kaj ĉu, pro sia kunkulpeco ĉe la




afero, kapablas restarigi tuje la rajtojn de la trompitoj.

Laŭ nia scio tiu ne estas la nursola okazo kaj sunklaras, ke ne estas la sama afero la paroladoj kaj bildkampanjoj kaj la realo, kiu aliigas ĉiam pli la gelaboristojn al objektoj de trouzo kaj ekspluatado kun la kunkulpo de politikistoj kaj entreprenistoj. Pli intense al la enmigruloj kiel plej senprotekta sektoro, sek ankaŭ kiel minaco aŭ ĉantaĝo sur la rajtoj de la tuta laborista klaso, ĉu en- aŭ eksterlanda.

Ĉar ni ne parolas nur pri senhontaj entreprenistaj gvidantoj, sed ĉefe pri la prienmigraj politikoj, ebligantaj la trouzojn. Ni ne pridubu, ke dum estos mizero, militoj aŭ rimedaj forraboj kaj malgraŭ ajnaj bariloj, la homoj alvenos ĉi-tien, dum ĉi-tie estos laboro, ĉu laŭleĝa aŭ kaŝa. Kaj, kiam ne estos plu laboro, ili foriros (aŭ ni foriros), kiel okazis ĉiam je la estinto, kien ajn estas ebloj, ĉar la homaj migrantaj kurentoj, kiel okazis ĉiam laŭlonge de la historio, emas al memregulo laŭ la bezonoj, kiuj kaŭzas ilin. Por nenio utilas la prikvotaj politikoj kaj eĉ malpli la subpremantaj leĝoj sur la enmigruloj. Klopodi nuligi la enmigradon per subpremado, krom krima estas tiel iluzia kiel klopodi trinki la tutan maran akvon. Tial la nursola realema kaj humana politiko estas agnoski la rajtojn de ĉiuj homoj ĉi-tie laborantaj, devenu el kie ajn ili devenu.

La ministro Celestino Corbacho, siaj kunregistoj kaj ĉiuj defendantaj la leĝajn ilojn de subpremado al la enmigruloj, kiel la hispana Leĝo pri Eksterlandanoj (kun parlamenta apogo el la PSOE kaj la PP, kaj kun reglamento paktita de la registaro, la entreprenistoj, la gvidantoj de CCOO kaj UGT kaj la partopreno de iuj NROj), aŭ la ĵus aprobita eŭropa gvidlinio pri reiro (Hontiga Gvidlinio), devus mediti pri la respondeco de ĉiuj ili pri la trouzoj, kiujn tiuj leĝoj enhavas, permesas kaj kaŭzas. La Eŭropo-Fortikaĵo de la kapitalo, je kiu ili engaĝiĝas, respondecas aldone pri la senĉesa vicaro de mortintoj ĉe la landlimoj kaj la marbordoj.

Sufiĉe! Rajtojn por ĉiuj!

# Maroko

## *José Pascual*

Ekde kiam Mohamedo la 6a prenis la povon post la morto de sia patro, Hasano la 2a, je la 1999a, alvenas senĉese novaĵoj pri malfermigo kaj demokratigo ĉe Maroko. La reĝimo faras aŭtentikajn streĉaĵojn, por ke la publika opinio, tial nacia kiel internacia, havu pli bonan koncepton pri tiu ĉi lando, sed reale temas pri nura vizaĝlavado.




Ni povas enkalkuli en tiu demokratiga klopodo la kreadon de la Instanco pri Justeco kaj Reakordigo (IJR) aŭ la reformigon de Prifamilia Kodo (*Moudawana*), kiun validas ekde la komenco de la 2004a. La IJR-on oni kreis por esplori la arbitrajn arestojn kaj malaperojn, kiuj okazis ĉe Maroko el la 1956a ĝis la 1999a. Tiu ĉi instanco ekzamenis plurajn denoncojn, pli ol 16.000, kaj la familianoj kaj tuŝitaj personoj ĝuis oportunon elmontri iliajn okazaĵojn eĉ per televidaj programeroj kun la nura kondiĉo, ke ne estu nomitaj la respondeculoj de la agoj, iuj el ili nunaj administraciaj altpostenuloj. Oni monkompensis la viktimojn kaj sekve de ĝiaj rekomendaĵoj oni kreis la makeradon de la Konsultiĝa Konsilantaro pri la Homaj Rajtoj (KKHR), kiu silentas antaŭ la senĉesaj perfortoj de la homaj rajtoj, kiuj okazas daŭre. La IJR estis klopodo pakti la nepunecon, la rifuzon postuli justicon pri la krimoj faritaj de la Alaŭia monarkio, precipe de Hasano la 2a, kaj daŭrigi kaŝigi terure subpremantajn epizodojn, kiel tiun suferita en la Rifo dum la ribelo de la 57a-58a, kiu eĉ ne estas nomita de la informaĵo de la IJR.

Ĉe la reformigo de la Prifamilia Kodo oni enmetis iujn leĝajn modifojn, kiuj favoras la virinojn, sed, kiam oni klopodas uzi tiun novan leĝon, oni trovas gravajn barilojn tiel ĉe la tribunaloj kiel ĉe la publika administracio. Je novembro de la 2007a estis prezentata en Novjorko la "Indekso pri laŭseksaj diferencoj" de la Tutmonda Ekonomia Forumo. Pere de tiu indekso la menciita institucio komparas la ekonomian ŝancon, la politikan povon, la instruadon kaj la aliron al la sanservoj de viroj kaj virinoj el 128 landoj (90% el la tutmonda loĝantaro) kaj Maroko estas la 122a en la vico, aldone ĝi subiris ekde la antaŭa jaro.

Rilate al la ĵurnalara kodo oni sekvis la saman taktikon. Oni prilaboras projekton por modifi tiun kodon kaj aldonas iujn deklaraciojn de Mohamedo la 6a, laŭdantaj la laboron de la geĵurnalistoj kaj priskribantaj ilin kiel "esencajn agantojn de la nacia publika vivo kaj nekontesteblajn kunlaborantojn ĉe la starigado de la demokratio", kaj tiel finas la aferon, ĉar, ekde kiam la nuna reĝo tenas la povon, estis fermataj pli ol 30 ĵurnaloj kaj ĉirkaŭ dudeko da ĵurnalistoj estis kondamnataj al prizonpunoj.

Ĉe tiu kadro de libermanko okazas sennombraj sociaj kaj laboraj luktoj kaj ĉiuj ili estas subpremataj per ekstrema malmoleco. La arestitoj dum la manifestacioj

de la pasinta 1a de majo kaŭze de “atenco kontraŭ tio sanktega” estas klara pruvo pri tio. Sed tio ĉi estas nura ekzemplo, okazas plurnombraj protestoj kiel tiu de la ministoj de Jbel Awam, la kamparanoj de Taroudant, de la senlaborecaj gediplomatuloj, ktp, kiuj estas silentigataj kaj subpremataj. La bruligo de la fabriko Rosamor ĉe Kazablanka, kie mortis pli ol 60 gelaboristoj, malkaŝigis tion kutiman ĉe la maroka labora mondo: gelaboristoj, pri kiuj oni ne kotizas al la socia sekureco, senkontraktuloj, infana laboro, plena mando de mezuroj de sekureco kaj labora sano, feŭdaj rilatoj inter mastro kaj laboristo, malkaŝa kunlaborado de la justico kaj la aŭtoritatoj kun la mastraro... Nu ĉe Maroko la malegaleco estas malkaŝa, ĉar la 70% de la naciaj rimedoj estas ĉemane de la 10% de la loĝantaro. La plimulto el la ekonomio estas kontrolata de malmultaj familioj, inter kiuj tiu reĝa, kiu posedas la 66% de la ONA-SIN, la entreprena konsorcio pli grava de la lando.

Sekve ni estas antaŭ kadro de malegaleco kun tragikaj sekvoj kiel la malriĉeca nivelo, kiu atingas la 25% el la loĝantaro, aŭ tiu de la analfabeteco, kiu superas la 40%. Tiun malegalecon akompanas manko el liberecoj, inter kiuj elstaras la manko de sprima kaj asocia liberecoj kaj la senĉesa cenzuro, kaj tio estas portata ĝis ajna ekstremo: arbitraj arestoj, subpremado, enprizonigoj, ktp.

**Kaj kion faras la internacia komunumo antaŭ tiu ĉi situacio?**

Ĝi centrigas sian agadon disvolvi la ekonomian kaj sekurigan politikon laŭ sia intereso. Maroko, kiel la kroma Magrebo, partoprenas la periferion de la EU, tiel ke tiu ĉi taksas ĝin parto el sia merkato. Ĉe tiu negoco la EU bezonas, ke Maroko estu ties landlimo, bremsanta la migrantajn kurentojn, kaj ankaŭ ke siaj entreprenaj grupoj kaj plurnaciaj entreprenoj eniĝu pli en la lando, alproprigante tiel ties rimedojn.




La hispanaj entreprenoj ne malŝparas tempon, Iberdrola kaj ONE (ĉefa maroka prielektra firmao) paktas starigi ventoenergian instalaĵon ĉe la Okcidenta Saharo forgesante la kontraŭleĝecon de tiu pakto, ĉar Maroko ne suverenas tiun teritorion, sed ĝi estas okupanta potenco. Inditex (Zara, Massimo Dutti, ktp) kaj la Maroka Asocio de Teksaĵa Industrio interkonsentis kunlaboradon. Ankaŭ estas societoj el hispanaj entreprenistoj, kiel la AEEA, Hispana Entreprenista Asocio el Agadir. La francaj entreprenoj ankaŭ ne eraras la vojon, la franca nuklea giganto Areva kaj la maroka kompanio pri fosfatoj OCP signis protokolon pri la eltirado de uranio. Moderna teĥniko igas profitodona la eltiron de uranio el fosfata acido kaj Maroko havas rezervon el 57,8 milionoj da tunoj, la 75% de la tutmonda entuto. La lineon el rapidtrajno, kunligonta Tanĝeron kaj Kazablankan, ankaŭ faros franca plurnacia firmao. Renault-Nissan starigos uzinon ĉe la sendogana areo de la nova havenego el Tanĝero por daŭrigi la delokigojn kaj malmultekostigi la elspezojn pri produktforto.

Por bremsi la migrantajn kurentojn estas egaj kvantoj da mono celantaj Marokon pere de subvencioj kaj helpoj. Krom ŝirmi la landlimojn, aliiĝante al eŭropa ĝendarmo, ankaŭ okazis pliiĝon de la vendado de militistaj rimedoj. Maroko estas iu el la ĉefaj klientoj de la hispanaj priarmilaj entreprenoj. Aldone al 1.200 tankoj kaj 800 militaj veturiloj, Hispanio vendis al tiu lando subrubrike de “aliaĵoj” varoj pri sekureco. Tiu rubriko de “aliaĵoj” inkluzivas aliajn kategoriojn kaj varojn de polica kaj kontraŭribela sekureco,




nekapabligantajn substancojn, komociantajn lum- kaj sonekipaĵojn, limigilojn por la homaj movoj aŭ elektroŝokajn armilojn. Fine de majo la hispanaj kaj marokaj peraeraj militaj fortoj realigos kunajn manovrojn (Atlasa Operaco), kiujn ili jam faras ekde antaŭ jaroj. La maroka registaro ekmarŝigis novan prisekurecan planon por la 2008a per pliigo de la 23% rilate de la pasinta jaro.

Sed estas ankaŭ taktiko de la okcidentaj landoj, apoganta la cenzurigan kaj subpremantan polikon de la Alaŭia reĝimo. Nicolas Sarkozy dum sia ĵusa vizito laŭdis la “demokratian viglon” kaj la “pluremecon” en Maroko. Tiuj ĉi deklaracioj okazis unu monato post la setembraj ŝtataj balotadoj. La oficilaj rezultoj prokrastis sian publikiĝon dum unu semajno kaj estis sindeteno el 63%, al kio oni devas aldoni 18% de nuligitaj voĉdonoj – multaj el ili kun insultoj por la partoprenantaj partioj– kaj unu milionon da neregistritaj voĉdonantoj. Plenaj urboj, kiel Sidi Ifni, bojkotis la balotadon.

Krome oni debas rimarki, ke sendepende de tiuj rezultoj estas la reĝo mem, kiu elektas la homojn, okupontaj la tiel nomitajn “suverenecaj ministrejoj”, kiel tiuj pri ekterlandaj aferoj, pri defendo, pri islamaj aferoj, pri enaj aferoj, ktp. Ankaŭ estas la reĝo, kiu elektas la ĉefan ministron, kaj ĉi-okaze li nomumis la koruptan Abbas El-Fassi, respondeculo pri la trompoŝtelo al 80.000 senlaboruloj de la afero Annajat, falsa entrepreno proponanta 30.000 laborpostenojn kaj kiu enkasigis 100 eŭrojn kontraŭ deviga kuraca testo ĉe kliniko el Kazablanka, ĉio garantiata de Abbas, tiama ministro pri laboro.

Rodríguez Zapatero havas ankaŭ sian propran apogomanieron por tiu ĉi reĝimon. Je la 2005a li premiis per la Granda Kruco de Izabela la Katolika (Bulteno Oficiala de la Ŝtato je la 15a de januaro de la 2005a) la generalon Hosni Bensliman, respondeculo kaj estro de la kampanjo el arestoj kaj malaperigoj ĉe Smara je la 1976a. Hosni Bensliman estas la supera respondeculo pri la policaro ekde la 1985a.

Mohamedon la 6an konvenas tiuj ludoreguloj. Li jam estas subpremanta sian popolon kaj ne bezonas plian streĉon por ampleksigi la subpremadon al la gemigrantoj, trairantaj la landon survoje al la eŭropa Eldorado.

Ni memoru pri la ĵusa okazaĵo ĉe la marbordo de Alhoceima, kie patrolŝipo de la reĝa mararmeo sinkigis pufboaton kaŭzante morton al 29 gemigrulojn. Kontraŭ tio miliardojn da eŭroj subvencie, blanketon por okupi kaj submeti la Saharan popolon kaj sennombrajn ekterlandajn investojn, el kiuj li eltiras profiton kaŭze de la amplekso de siaj negocoj. Tiu ĉi komedio estas survestita per deklaracioj de okcidentaj gvidantoj, laŭdantaj la demokratigan procezon entreprenita de tiu ĉi lando kaj kun egaj aplaŭdoj sur la nurŝajnaj malfermaĵoj de la Alaŭia reĝimo.



# Tio, kio konvenciigas la nekonvenciajn komunikilojn

*Noam Chomsky*

Iu el la kialoj, pro kiuj mi verkas pri la amasinformiloj estas tio, ke mi interesiĝas pri la intelekta kulturo entute, kaj ties plej facile studebla parto estas la amasinformiloj. Ili aperas ĉiutage, vi povas realigi sisteman reserĉon. Vi povas kompari la hieraŭan kaj la hodiaŭan versiojn. Estas plurnombraj pruvoj pri tio, kion oni ĉefigas kaj kion ne, kaj pri kiel oni strukturigas la aferojn.

Laŭ mia opinio la amasinformiloj estas ne tre malsimilaj ol la universitatoj aŭ ekzemple ol la gazetoj de intelktula opinio. Estas iuj aldonitaj limigaĵoj, sed ili ne estas ĝisfunde malsimilaj. Amasinformiloj kaj universitato interagas, kio klarigas la sufiĉan facilecon, per kiu oni transiras el unu al alia.

Por kompreni la amasinformilojn –aŭ kiun ajn institucion–, ni observadas ilin, temigas la enan institucian strukturon, serĉas sciaĵojn pri la posteno, kiun ili okupas en la socio je la plej ampleksa senco, kaj pri kiel ili rilatas kun la ceteraj pov- kaj aŭtoritatsistemoj. Se fortune, povas esti ĉe la informiga sistemo



ena registro pri la gvidantoj, kiu sciigu nin pri iliaj emoj (ĝi estas ia doktrina sistemo). Mi ne celas la manifestojn, pretigitaj por ili de la publikrilatistoj, sed kion ili diras private. Estas sufiĉa interesoplena dokumentaro.

Tiuj ĉi estas la tri ĉefaj fontoj el sciigaĵoj pri la amasinformiloj. Ni studas ilin, kvazaŭ scienculo studus malsimplan molekulon aŭ ion similan. Ni ekzamenas la strukturon kaj formulas hipotezon, baziĝinta sur tiu strukturo, pri la aspekto, kiun probable havos amasinforma produktaĵo. Poste ni testas la amasinforman produktaĵon kaj konstatas kiagrade ĝi akordas kun la hipotezo. Praktike ĉia analizo pri la amasinformaj modeloj estas faritaj tiel: oni studas kiel eble plej akurate, kiel estas la produktaĵo, kaj se ĝi akordas kun la okulfrapaj supozoj pri la naturo kaj la strukturo de la amasinformiloj.

Nu, kion ni eltrovas? Unue, ni eltrovas, ke estas malsimilaj amasinformiloj, kiuj faras malsimilajn aĵojn, kiel ekzemple la amuzindustrio de Holivudo, la televidfelietonoj kaj eĉ la plimulto el la ĵurnaloj de lando (la ega plimulto). La amasinformiloj celas la publikon je ĝenerale. Estas alia sektoro de la amasinformiloj, tiuj elitaj, foje konitaj kiel la informiloj, starigantaj la agendon, ĉar ili kalkulas grandajn rimedojn kaj starigas la kadron, kie agas la ceteraj amasinformiloj. Ekzemple, *New York Times* kaj *CBS*. Ilia publiko estas ĉefe privilegiitaj homoj. Kiuj legas *New York Times* –riĉuloj aŭ anoj de la t.n. politika klaso–, tiuj estas senĉese engaĝiĝintaj kun la politika sistemo. Ili povas esti politikaj administrantoj, entreprenaj administrantoj (kiel stabanoj el grandaj firmaoj aŭ similaj), doktrinaj administrantoj (kiel universitataj profesoroj) aŭ ĵurnalistoj, okupiĝantaj pri kiel la homoj

devas pensi kaj rigardi la mondon.

La elitaj amasinformiloj starigas la kadron, kie laboras tiuj ceteraj. Rigardu la *Associated Press*: ĝi produktas senĉesan fluon el novaĵoj, sed ĉiutage je la meza vespero haltas kaj sendas mesaĝon, kiu laŭtas "Avizo por eldonantoj: la morgaŭa *New York Times* montros titolpaĝe la sekvajn aferojn". La celo estas neniu alia ol tio, ke, se vi estas ĵurnaleldonanto ĉe Dayton (Ohio) kaj havas neniun rimedon por distingi tion, kio estas novaĵo, aŭ simple vi deziras ne zorgi pri tio, la avizo informas vin, pri kio estas novaĵo. Tiuj estas la aferoj por la paĝoj, kiujn ne planas dediĉi al lokaj temoj aŭ al amuzaĵoj. Tiuj estas la aferoj, kiujn vi publikigas, ĉar tio estas, kion diras *New York times*, ke interesos vin morgaŭ. Se vi estas eldonanto ĉe Dayton (Ohio), certe vi devos agi tiel, ĉar vi ne havas multajn pliajn fontojn de informado. Se vi deflankiĝas el la markata vojo, se vi generas historiojn, kiuj ne plaĉas la gravan ĵurnalaron, baldaŭ ili sciigos vin pri tio. Fakte, kio okazis al *San Jose Mercury,* estas drama ekzemplo pri tio. La povo havas multajn kielojn reirigi vin sur la ĝusta vojo, se vi eliras el ĝi. Se vi klopodas rompi la moldilon, vi ne daŭros multe. Tiu sistemo funkcias sufiĉe bone kaj memkompreneble ĝi estas nenio plu ol speguliĝo el povstrukturoj.

La informiloj vere amasaj klopodas ĉefe amuzi la homojn. Se ili deziras fari ion plu, ili faru, sed ili ne ĝenu nin (nin, kiuj kondukas la dancon). Ili interesiĝu pri la profesiaj sportoj, ekzemple. Ili freneziĝu pri la profesiaj sportoj, pri la seksaj skandaloj, pri la famuloj kaj ties problemoj kaj pri pliaj aĵoj similaj. Pri kio ajn, nur kondiĉe ke ne estu io serioza. Memkompreneble la seriozaj aferoj estas por la influohavaj homoj. "Ni" zorgos pri ili.

Kio estas la elitaj amasinformiloj, starigantaj la agendon? *New York Times* kaj *CBS*, ekzemple. Nu, unue ili estas grandaj entreprenoj kun grandaj profitoj. Aldone la plimulto estas ligitaj al aŭ estas parto de pli grandaj entreprenaj grupoj kiel *General Electric* aŭ *Westinghouse*. Tiuj ĉi firmaoj estas ĉe la supra pinto de la povstrukturo de la privata ekonomio, kiu estas tre tirana. La grandaj firmaoj estas ĝisfunde tiranaj, hierarkiaj kaj kontrolataj desupre. Se ne plaĉas al vi, kion ili faras, foriru. La ĉefaj amasinformiloj estas nur parto el tiu sistemo.

Kion oni povas diri pri ilia institucia medio? Nu, pli malpli la samon. Ke ili interagas kun aliaj gravaj povcentroj kaj ke ili interrilatas la registaron, aliajn grandajn entreprenojn aŭ la universitatojn. Ĉar la amasinformiloj estas doktrinigaj sistemoj interagantaj intime kun la universitatoj. Ni supozu, ke vi estas ĵurnalisto, kiu verkas raportaĵon pri la Azia Sudokcidento, Afriko aŭ io simila. Supozeble vi iros al granda universitato kaj serĉos fakulon, kiu diros al vi, kion vi devas surpaperigi; kaj alternative vi iros al fondaĵo kiel *Brooking Institute* aŭ *American Entreprise Institute* kaj ili donos al vi la vortojn, kiujn vi devos uzi. Tiuj ĉi eksternaj institucioj estas tre similantaj la amasinformilojn.

La universitatoj, ekzemple, ne estas sendependaj institucioj. Povas esti en ili izolaj sendependaj homoj, sed tio ankaŭ pravas pri la amasinformiloj. Kaj ĝenerale tio pravas pri la grandaj entreprenoj. Tio pravas eĉ pri la faŝismaj ŝtatoj. Sed la institucio mem estas parazita. La universitatoj dependas el eksteraj financfontoj kaj tiuj ĉi financfontoj, kiel privataj riĉaĵhavantoj, grandentreprenaj subvencioj kaj la registaro (kiu estas tiel implikata kun la entreprenista povo, ke oni apenaŭ povas diferencigi ilin), konsistigas la senpera medio de la universitatoj. Tiuj ne adaptiĝantaj al tiu ĉi strukturo, ne akceptantaj kaj sinenigantaj ĝin (vi certe

ne povas labori tie, escepte ke vi vinenigu ĝin kaj kredu je ĝi), tiuj, kiuj ne faras tion, probable estos deflankigitaj je iu punkto de la trajekto, kiu komencas en la infanĝardeno. Estas ĉiaspecaj filtriloj por forpuŝi la homojn ĝenantajn kaj kiu pensas sendepende. Tiuj el vi, kiuj vizitis universitaton, scias, ke la docenta sistemo estas tre celanta premii la submetiĝon kaj obeadon; se vi ne agas tiel, vi aliiĝos al agitisto. Tiel do estas ia filtrigmekanismo, kiu fine generas homojn, kiuj per vera honesteco (ili ne mensogas) sinenigas la kadron el kredoj kaj sintenoj de la sistemo de socia povo, ĉirkaŭanta ilin. La elitaj institucioj kiel *Harvard* kaj *Princeton* kaj la etaj altrangaj universitatoj estas tre fokuzitaj al la sociigo. Se vi vizitas universitaton kiel *Harvard*, kion ili lernigos al vi, estos kondutmanieroj: kiel sinteni kiel ano de la altaj klasoj, kiel pensi ĝuste, ktp.

Meze de la 40aj George Orwell verkis *Ribelo en la farmo*-n. Ĝi estis satiro kontraŭ la Sovetia Unio, totalisma ŝtato. Ĝi ĝuis grandan sukceson. Ĝi ravis ĉiujn. Nu, okazas, ke Orwell verkis antaŭparolon al *Ribelo en la farmo*, kiu estis neniigita. Ĝi aperis nur post 30 jaroj. Iu eltrovis ĝin inter liaj paperoj. La antaŭparolo al *Ribelo en la farmo* temis pri la "literatura cenzuro ĉe Anglio" kaj tio, kion ĝi diras, estas, ke okulfrape la libro ridindas la Sovetian Union kaj ties totalisman strukturon. Sed ĝi ankaŭ diras, ke Anglio ne estas tro malsimila. Ni ne havas la KGB-n sur nia kapoj, sed la fina rezulto estas preskaŭ la sama. Estas forigitaj tiuj, havantaj sendependajn ideojn aŭ malĝustajn pensojn.

Ĝi parolas iom, nur du frazojn, pri la institucia strukturo. Ĝi pridemandas kial okazas tio, kio okazas. Nu, unue ĉar la ĵurnalaro apartenas al riĉuloj, kiuj deziras, ke nur determinitaj sciigaĵoj trafu la publikon. Due ĉar, kiam vi pasas tra elita docenta sistemo, kiam vi vizitas la plej bonajn fakultatojn el *Oxford*, vi lernas, ke estas iuj aferoj ne parolindaj kaj iu pensaĵoj ne pensindaj. Tia estas la sociiga rolo de la elitaj institucioj kaj, se vi ne adaptiĝas, vi estas disigita. Tiuj du frazoj pli malpli klarigas ĉion.

Kiam ni kritikas la amasinformilojn kaj diras "rimarku, tio estas, kion verkas Anthony Lewis aŭ aliuloj", ili tre koleriĝas. Ili diras sufiĉe ĝuste, ke "Neniu diris al mi, kion mi estas skribonta. Mi verkas, kion mi deziras. Ĉiu debato pri la premoj kaj limigoj mankas sencon, ĉar neniam mi ricevis ian". Kio estas tute prava, sed la afero estas, ke ili ne estus, kie ili estas, se antaŭe ili ne estus demostrintaj, ke neniu bezonas diri al ili, kion ili devas verki, ĉar ili jam verkas, kion ili devas verki. Se ili estus komencintaj ĉe la priloka sekcio, ekzemple, kaj ili estus atentigantaj malĝustajn historiojn, ili neniam estus atingintaj la postenojn, ĉe kiuj nun povas diri, kion ili volas. Same okazas ĉe la universitataj fakultatoj kun la pli ideologiaj fakoj. Ili pasis tra la sociiga sistemo.

Bonege, nun trarigardu la tutan sistemstrukturon. Kiel vi kredas, ke devas esti la novaĵoj? Nu tio estas sufiĉe okulfrapa. Prenu la *New York Times*. Ĝi estas granda entrepreno kaj vendas produktaĵon. Ĝia produktaĵo estas la spektantarojn. La monon ne gajnas ili, kiam ni aĉetas la ĵurnalon. Ili kontentas alŝuti ĝin senkoste al la Interreto. Fakte ili perdas monon, kiam ni aĉetas la ĵurnalon. Ĝia produktaĵo estas la spektantaro. La produktaĵo estas la privilegiaj homoj, kiel tiuj verkantaj por la ĵurnaloj, vi scias, la homoj prenantaj sociajn altnivelajn decidojn. Produktaĵo devas esti vendata ĉe merkato kaj la merkato estas memkompreneble la reklamistoj (tio estas, aliaj grandaj entreprenoj). Tiel se temas pri la televido aŭ pri ĵurnaloj aŭ kio ajn, ili vendas spektantaron. La grandaj entreprenoj vendas spektan-

tarojn al aliaj grandaj entreprenoj. Ĉeokaze de la elitaj amasinformiloj tremas pri tre grandaj entreprenoj.

Nu kiaj estos laŭ via kredo la sekvoj el tio? Kiujn prognozojn ni povas fari pri la naturo de la amasinforma produktaĵo sub tiuj ĉi cirkonstancoj? Kiu estos la nula hipotezo, tiu konjekto, kiun ni povas fari sen antaŭsupozi nenion plu? La okulfrapa antaŭsupozo estas, ke la produktaĵo de la amasinformiloj, tio aperanta kaj tio ne aperanta, la kielo prezenti la aferojn, respegulos la intereson de la aĉentantoj kaj de la vendistoj, de la institucioj kaj povsistemoj, ĉirkaŭantaj ilin. Se tio ne okazus, estus ia miraklo.

Bone, nun komencas la malfacila laboro. Vi eble demandas, ĉu reale la amasinformiloj funkcias, kiel ni prognozis? Nu, findecidu vi mem. Estas abunda materialo pri tiu tiom evidenta hipotezo. Ĝi estis submetata al la plej rigoraj elprovoj imageblaj kaj sukcesis notinde bone. Ĉe la sociaj sciencoj estas neniu konkludo pli taŭge argumentata ol tiu ĉi, kio estas nenia granda surprizo: la miraklo estus la neplenumo de tiu ĉi hipotezo sub la agantaj fortoj kaj la kielo, kiel ili agas.

La sekvan eltrovaĵo estas, ke tiu ĉi temo estas plene tabua. Se vi vizitas la *Kennedy School of Government*-n ĉe Stanford aŭ similaj lokoj kaj studas ĵurnalismon, komunikscienccon, akademia politikscienccon, ktp, probable ne aperos tiuj aferoj. Tio estas, la hipotezo, kiun kiu ajn fine starigus eĉ sen scii nenion, ne estas esprimebla, kaj oni ne konsideras la pruvon, kiu demonstras ĝin. Nu tio ankaŭ estis prognozata. Se ni ekzaminas la institucian strukturon, ni diros certe, ke tio devas esti tiel, ĉar, kial tiuj homoj volus riskiĝi? Kial ili devus permesi kritikojn al tio, kion ili mem stimuligas? La respondo estas, ke estas nenia kialo, por ke ili permesu ilin kaj fakte ili ne permesas ilin. Denove ne temas pri rekta cenzuro. La afero estas simple, ke, se vi agas alimamiere, vi ne atingas tiujn postenojn. Tio inkluzivas tiel la maldekstron (tion, kion ni nomas maldekstro) kiel la dekstron. Escepte ke vi estis taŭge sociigita kaj trejnita por ne havi certajn pensojn, ĉar, se vi havos ilin, vi ne estos tie. Tial estas prognoza dua grado: la unua grado de prognozo estas for de la debato.

La lasta ekzamenenda flanko estas la doktriniga kadro, kie okazas tio entute. La homoj, okupantaj la plej altajn nivelojn de la informa sistemo inkluzive de la amasinformiloj, la reklamistoj kaj la akademia politikscienco, tiuj ĉi homoj, kiam ili verkas por si mem (ne kiam ili verkas promociajn paroladojn), ĉu ili havas reprezentaĵon pri tio okazanta? Ĉe la promociaj paroladoj ĉio estas belaj vortoj. Sed, kiam ili verkas por si mem, kion diras tiuj ĉi homoj pri ĉio tio?

Estas ĉefe tri ekzamenendaj fontoj. La unua estas la industrio pri publikaj rilatoj, vi scias, la granda industrio pri propagando. Tiel do kio diras la gvidantoj de la industrio pri publikaj rilatoj? La dua fonto estas la tiel nomitaj publikaj intelektuloj, grandaj pensuloj, homoj verkantaj ĉe la opinipaĵoj kaj ĉio tio. Kion ili diras? La homoj verkantaj impresajn librojn pri la naturo de la demokratio kaj tiu speco de aĵoj. La tria ekzamenenda fonto estas la akademia fluo, aparte la parto de la politika scienco, tuŝanta la komunikadon kaj la informadon kaj tiajn aĵojn, kiu estis branĉo de la politikscienco ekde antaŭ 70 aŭ 80 jaroj.

Sekve nepras observi tiujn tri flankojn, atenti pri tio, kion ili diras, kaj ekzameni la grandajn eminentulojn, verkantaj pri ĉio tio. Ĉiuj diras (kaj mi citas parte), ke la normalaj personoj estas "nesciantaj kaj scivolemaj entrudiĝuloj". Ni devas eviti ilian eniron en la publikan scenon, ĉar ili estas tro stultaj, kaj, se ili enirus tien, ili generos

nur problemojn. Ilian devon konsistigas esti “spektantuloj” ne “partoprenantoj”.

Oni permesas ilin baloti de tempo al tempo, elekti iun el tiuj klugaj uloj. Sed oni supozas, ke ili reiras domen kaj faras aliaĵojn, kiel spekti piedbalonon aŭ kion ajn.

La “nesciantaj kaj scivolemaj entrudiĝuloj” tamen devas esti observantoj kaj ne partoprenantoj. La partoprenantoj estas la t.n. “respondecaj homoj” kaj memkompreneble la verkinto ĉiam estas iu el ili. Ĉu vi ne memdemandis iam, kial mi estas “respondeca homo” kaj tiu restas en prizono? La respondo estas tro okulfrapa. Ĉar vi estas obeantaj antaŭ la povo kaj estas subordigitaj al ĝi kaj tiu povas esti sendependa. Sed memkompreneble vi ne memdemandas tion. Sekve estas la klugaj uloj, kiuj supozeble gvidas la dancon, kaj la ceteraj supozeble forestas, kaj ni devas ne cedi (mi citas el akademia artikolo) “al demokratiaj dogmemoj, laŭ kiuj ĉiu individuo estas la plej bona juĝisto pri siaj interesoj”. Li ne estas tio. Ili estas malbonegaj juĝistoj pri siaj propraj interesoj, tial ni devas fari tion pro ilia propra bono.

Fakte tio similas la leninismon. Ni faras tion por vi kaj faras tion por la intereso el ĉiuj, ktp. Mi kredas, tiu estas parte la kialo, per kiu historie estis tiom facila por ili ŝanĝi uniformon: nun ili estas entuziasmaj stalinistoj, nun estas grandaj partianoj de la usona povo. La homoj ŝanĝas tre facile el iu posicio al alia, kaj mi kredas, ke tio okazas, ĉar temas funde pri la sama posicio. Nur ŝanĝas la estimon, pri kie estas la povo. Estas momentoj, kiam vi kredas, ke ĝi estas tie ĉi, kaj momentoj, kiam vi kredas, ke ĝi estas tie. Sed la posicio adoptata de vi ne ŝanĝas.

Kiel komencis ĉio tio? Tiu estas interesoplena historio. Granda parto de la historio ekas je la unua tutmonda milito, kiu estas la granda transfleksiĝa punkto. La usona posicio ĉe la mondo ŝanĝis notinde. Je la 18a jarcento Usono jam estis la plej riĉa lando el la mondo. La angla alta klaso estis atingonta la vivkvaliton, la sanon, la vivdaŭron de Usono nur komence de la 20a jarcerto, ni ne parolu jam pri la cetera mondo. Usono estas eksterordinare riĉa, kun egaj avantaĝoj kaj fine de la 19a jarcento havis kun granda diferenco la plej gravan ekonomion el la mondo. Tamen ĝi ne estis la plej grava aktoro ĉe la tutmonda scenejo. La usona povo ampleksis sur la karibaj insuloj kaj parto de la Pacifiko, sed ne multe plu.

La rilatoj ŝanĝis dum la unua tutmonda milito. Kaj ili ŝanĝis pli drame dum la dua tutmonda milito. Post tiu ĉi milito Usono iĝas pli malpli la mastro de la mondo. Sed post la unua tutmonda milito jam estis ŝanĝo kaj Usono pasis el ŝuldanta nacio al kreditora nacio. Ĝi ne estis ĉefega potenco kiel Anglio, sed iĝis unuefoje ĉefa rolulo ĉe la mondo. Tio estis ŝanĝo, sed estis aliaj.

La unua tutmonda milito estis la unua okazo, je kiu estis disdonata ŝtata propagando altgrade organizita. La angloj starigis la Priinformadan Ministerion kaj ili reale bezonis ĝin, ĉar ili bezonis la ekpartoprenon de Usono en la milito aŭ aliiel ili estus havintaj gravajn malfacilaĵojn por venki. La Priinformada Ministerio okupiĝis sendi propagandon al Usono, enhavigante en ĝi falsegajn elpensaĵojn pri la teruraĵoj faritaj de la “hunoj” kaj similaĵojn. Celo de la propaganda estis la usonaj intelektuloj, ĉar la angloj tre saĝe pensis, ke tiu estis la plej sensibla sektoro por kredi la propagandon. Ankaŭ estis ili, kiuj disdonis ĝin en sia sistemo. Tiel do, la propagando celis la usonajn intelektulojn kaj efikis tre taŭge. La dokumentoj de la angla Priinformada Ministerio (multaj el kiuj estas malsekretigitaj) montras, ke la celo estis, per iliaj propraj vor-

toj, kontroli la pensadon de la tuta mondo kaj aparte tiun de Usono. Ilin ĝenas malmulte, kion pensas la homoj en Hindujo. Tiu Priiformada Ministerio atingis plene trompi la usonajn intelektulojn ĝis kredigi ilin pri ĉiuj la elpensaĵoj de la angla propagando. Ili tre fieris pri tio. Kaj prave, ĉar tio savis ilian vivon. Kontraŭe ili estus malvenkintaj la unuan tutmondan militon.

Ĉe Usono estis samvalora fenomeno. Woodrow Wilson estis elektata je la 1916a kun elekta programo kontraŭmilita. Usono estis tre pacema lando. Ĝi estis ĉiam tiel. La homoj ne volis batali en eksternaj militoj. La lando tre kontraŭstaris la unuan tutmondan militon kaj Wilson fakte estis elektita kaŭze de sia kontraŭmilita sinteno. "Pacon sen venko" estis lia slogano. Sed Wilson deziris militi. Sekve la afero estis, kiel oni atingas aliigi paceman loĝantaron al furiozaj kaj frenezaj kontraŭgermanistoj pretaj mortigi ĉiujn germanojn? Tiu sintenŝanĝigo postulas propagandon. Tiel ili starigis la unuan kaj reale nursolan grandan ŝtatan agentejon el usona historio. Ĝi nomiĝis Komitato pri la Publika Informado (bela orwella titolo), ĝi ankaŭ nomiĝis Komisiono Creel. La ulo, gvidanta ĝin, nomiĝis Creel. La tasko de tiu ĉi komisiono estis konduki la loĝantaron al patria histerio per uzado de propagando. Ĝi sukcesis nekredeble. Post malmultaj monatoj eksplodis furioza promilita histerio, permesanta la ekpartoprenon de Usono en la milito.

Multaj homoj restis impresitaj de tiuj faktoj. Iu de la impresitoj –kaj tio havis iujn sekvojn je la estonto– estis Hitler. En *Mein Kampf* Hitler konkludas per ia praveco, ke Germanis malvenkis la unuan tutmondan militon, ĉar ĝi malvenkis la priprogandan batalon. Ĝi ne taŭgis konkuri kun la angla kaj usona propagando, kiu tute premplatigis ĝin. Hitler promesis, ke la sekvonta fojo ĝi havos propran propagandan sistemon, kio li faris dum la dua tutmonda milito. Kaj, kio plej gravas por ni, la usona entreprenistaro ankaŭ estis forte impresita de tiu propaganda streĉado. Tiumomente ili havis problemon. La lando iĝis formale pli demokratia. Multaj homoj volis baloti kaj similaĵojn. La lando pliriĉiĝis kaj pliaj homoj povis partopreni, estis alvenantaj multaj enmigruloj, ktp.

Alvenintaj al tiu situacio, kion oni faru? Estos pli malfacile gvidi la entuton kiel privatan klubon. Sekve nepras kontroli la pensadon de la homoj. Estis fakuloj pri publikaj rilatoj, sed neniam estis publikrilata industrio. Estis ulo taskita pliagrabligi la ŝajnon de Rockefeller kaj tiuspecaj aferoj. Sed tiu ega publikrilata industrio, kiu estas usona inventaĵo kaj monstra industrio, ekaperis kaŭze de la unua tutmonda milito. Ĝiaj ĉefaj gvidantoj estis homoj de la Komisiono Creel. Fakte tiu plej ĉefa, Edward Bernays, eliris rekte el la Komisiono Creel. Bernays verkis libron, ekaperinta ĵus poste, titolita Propagando. Certe tiam la vorto "propagando" havis neniun nean subsencon. Estis nur dum la dua tutmonda milito, ke la vorto tabuiĝis, ĉar oni rilatigis ĝin kun la germanoj kaj tuta serio el malbonaj aferoj. Je tiu periodo tamen la vorto propagando nur signifis informadon aŭ similaĵojn. Tiel Bernays verkis libron titolitan Propagando ĉirkaŭ la 1925a, kiu komencas klarigante, ke li praktikigas la lecionojn de la unua tutmonda milito. La propaganda sistemo de la unua tutmonda milito kaj komisiono, kiun li partoprenis, montras laŭ Bernays, ke eblas "regi la publikan menson same kiel la armeo regas la soldatojn". La inteligentaj malplimultoj uzis tiujn novajn teknikojn pri mensregado, diris Bernays, por sekurigi, ke la fikanajlaro restu je la loko, al kiu ĝi apartenas. Ni povas fari tion, ĉar ni havas tiujn ĉi novajn teknikojn.

Tiu ĉi estas la plej grava

manlibro de la publikrilata industrio. Bernays estas speco el guruo. Li estis aŭtentika liberalulo kiel Roosevelt aŭ Kennedy. Li ankaŭ desegnis la programon de publikrilatoj, ebliganta, ke Usono apogis la puĉon, kiu faligis la demokratian registaron el Gvatemalo.

Lia ĉefa sukceso, tiu vere donanta al li la famon fine de la jardeko de la 1920a, estis atingi, ke la virinoj fumu. Tiam la virinoj ne fumis kaj li pretigis gigantajn kampanjojn por *Chesterfield*. Ĉiuj vi konas tiujn teknikojn: modelulinoj kaj kinostelulinoj kun cigaredo ĉebuŝe kaj similaĵoj. Li ricevis laŭdegojn. Li iĝis gvida stelulo de la industrio kaj lia libro fariĝis aŭtentikan lernolibron.

Walter Lippmann estis plia ano de la Komisio Creel, la plej respektata personeco de la usona ĵurnalismo dum jarcentduono (mi priparolas la seriozan usonan ĵurnalismon, la opiniartikolojn). Li verkis ankaŭ la t.n. progresemajn eseojn pri la demokratio, taksitaj progresemajn dum la jardeko de la 1920a. Lippmann kiel Barneys limiĝis uzi tre eksplizite la resultojn de la propaganda laboro. Lippmann asertis, ke estis nova arto ĉe la demokratio nomita "manufakturo de la konsenton". Tiuj ĉi estis liaj vortoj kaj mi elprenis ilin por nia libro, sed ili devenas el Lippmann. Tiel do laŭ Lippmann ĉe la demokratia metodo aperas tiu ĉi nova arto, la "manufakturo de la konsento". Pere de tiu manufakturo de la konsento oni povas kompensi la fakton, ke multaj homoj havas la formalan rajton voĉdoni. Ni povas atingi, ke tiu ĉi rajto fariĝos sengrava, ĉar ni povas manufakturi la konsenton kaj garantii, ke iliaj opinioj kaj sintenoj estu strukturigitaj tiel, ke ili faros ĉiam, kion ni diros al li, li havas eĉ formalan kielon partopreni. Tiel do ni havos realan demokration kaj ĝi funkcios ĝuste. Tio ĉi estas praktiki la instruaĵojn de la pripropaganda agentejo. La akademiaj prisociaj kaj pripolitikaj sciencoj havas komunan devenon. La fondinto de tio, kion ni nomas komunikadon kaj akademian pripolitikan sciencon, estas Harold Glasswell. Lia ĉefa kontribuo estis libro, etudo pri la propagando. Gasswell diris tre sincere tiujn aĵojn, pri kio mi parolis antaŭe –ĉio tio pri ne cedi al la dogmema demokratio–, devenantajn el la akademia pripolitika scienco (Glasswell kaj aliaj). Denove eltirante instruaĵojn el la milito, la politikaj partioj eltiris la samajn instruaĵojn, ĉefe la Konservativa Partio el Anglio. Liaj unuaj dokumentoj, kiuj ĵus aperas publike, montras, ke ili ankaŭ agnoskis la sukcesojn de la angla Priinformada Ministerio. Ili agnoskis, ke la lando demokratiiĝis ĉiam pli kaj ke ĝi ne estos plu privata virklubo. Tiel la konkludo estis, laŭ iliaj propaj vortoj, ke la politiko devis aliiĝi al politika milito kaj ke nepris apliki la propagandajn meĥanismojn, kiuj tiel brile funkciis por kontroli la menson de la homoj dum la unua tutmonda milito.

Tiu ĉo estas la doktrina flanko kaj ĝi koincidas kun la institucia strukturo. Ĝi firmigas la prognozojn pri kiel devus funkcii la aferoj. Kaj la prognozoj estas taŭge konfirmitaj. La konkludoj ankaŭ estas ne kontesteblaj. Ĉio tio nun partoprenas la regantan literaturon, sed estas nur je dispono por la enaj homoj. Ĉeuniversitate oni ne legas la klasikojn pri kiel kontroli la menson de la homoj.

Same kiel oni ne legas, kion diris James Madison dum la konstitucia konvencio pri tio, ke la ĉefa celo de la nova sistemo devis esti "protekti la malplimulton el la riĉeguloj kontraŭ la plimulto" kaj ke la sistemo devis esti desegnita laŭ la bezonoj de tiu ĉi celo. Tiu ĉi estas la origeno de la konstitucia sistemo, neniam studata de iu. Vi eĉ ne trovos tion ĉe la akademia erudicio, krom se vi streĉiĝu multe.

Tiu ĉi estas laŭ mia rigardo, proksimume la bildo, pri kiel estas la institu-

cia sistemo, la subtenantaj doktrinoj kaj la sekvoj el tio. Estas alia flanko celanta la entrudulojn "nesciantajn kaj scivolemajn". Ĝi celas ĉefe la uzadon de amuzoj el iu aŭ alia speco. Vi povas dedukti, laŭ mia kredo, kion vi trovos tie.

# 11-S: la oficiala versio estas plene senkongrua historio

*Gemma García*


**La 11a tago de ĉiu monato la grupo *barcelona11s* surstratiĝas por disdoni sciigaĵojn, kontraŭdiranta la oficialan version pri la atenco kontraŭ la *World Trade Center* de Novjorko je la setembro de la 2001a. Dokumentoj kiel la libro *La CIA kaj la 11a de setembro*, verkita de la germana eksa ministro kaj parlamentano Andreas von Bulowi, kondukis Manuel García-n krei retpaĝon solidarece al la movado *truthaction.org* por la vero pri la 11-S. Grupo de personoj igis el *barcelona11s.org* montrejon por videbligi la truojn, la kontraŭdirojn kaj la pruvmankon de la oficiala versio.**

***Ĉu eble neprus reekzameni malrapide kaj akurate la oficialan version pri la 11a de setembro, por ke ni komprenu, ke ni estis malbone informataj?***

La amasinformiloj havis gravan respodecon pri la manipulado de tiu momento. Estas ne kontestebla, ke la 11a de setembro ŝanĝis la rumbon de la historio. Ĝi estis la elirpafo por la milito *kontraŭ la teroro*, kiu servas kiel pretekto por realigi kontraŭleĝajn arestojn, torturojn, invadojn kaj limigadon de la liberecoj ajne ĉe la mondo. Kadre de tiu milito sen videbla malamiko kaj sen fino la regantoj de multaj landoj prenas mezurojn por *protekti nin* pere de instalado de filmilojn surstrate, aprobi orwellan leĝaron pri arestoj sen *habeas corpus*, ktp. La amasinformiloj flankenigas for el tiu kadro ĉiun kritikon al la oficiala versio pri la 11-S, taksanta ĝin konspira cele eviti la kritikan debaton. Malgraŭ tio pli ol duono el la usona loĝantaro kredas, ke oni mensogis ilin pli aŭ malpli kvante.

**Per kio oni mensogis nin?**

Iujn ekzemplojn. Osama Bin Laden aperas sur la listo pri la plej serĉataj de la FBI, kvankam rimarkinde li ne estas serĉata pro la atencoj de la 11-S. La donita kialo estas pruvmanko. Alia rimarkinda ekzemplo: se vi demandas iun ajn pri kiom da turoj falis je la 11-S, li respondas, ke du. Tamen tiu sama vespero la konstruaĵo WTC7 –kun ŝtala strukturo kaj 47 etaĝoj– faliĝis simetrie kaj per rapido de libera falo, nekontesteble kiel kontrolata disfrakaso. la amasinformiloj kaŝas tiun fakton kaj la raporto  de la Komisiono pri la 11-S eĉ ne nomas la WTC7-n. Aliflanke la laŭnorma proceduro de la NORAD (Usona Aerospac-Defenda Komando) estas bari devojantajn flugmaŝinojn per malpli ol 15 minutoj. Tion ili faris kontentige 129 fojojn je la 2000a jaro kaj 67 fojojn el setembro de la 2000a ĝis junio de la 2001a. Kontraŭe je la 11a de setembro ili malsukcesis 4 fojojn. Rimarkinde ekde antaŭ monatparo estis Dick Cheney, kiu kontrolis la agentejon kaj la generaloj ha-



vis neniun povon por ordoni la faligon de flugmaŝinoj.

**Ĉu la turoj frakazis kaŭze de la frapo de flugmaŝinoj sub la kontrolo de Al-Kaida?**

Estas multaj fizikaj evidentaĵoj montrantaj, ke la turoj ne frakazis kaŭze de la bato. La falrapido estis ĉirkaŭantaj la liberan falon kaj preskaŭ la tuta betono estis polviĝinta. Estas sciencaj etudoj, demontrantaj la neeblon de la oficiala versio, pluraj atestantoj parolantaj pri eksplodoj, inkluzive de fajrestingistoj kaj vunditoj de eksplodoj antaŭaj al la frapo de la flugmaŝinoj. Rilate de Al-Kaida oni plene scias, ke ĝi estis starigita de la pakistanaj sekretaj servoj, la ISI, kiu siavice estis sub la ordenoj de la CIA, dum la konflikto kontraŭ la eksa USSR ĉe tiu ĉi regiono. Alia interesoplena datumo estas, ke Al-Kaida tradukeblas kiel datenbazo, kurioza nomo por terorista organizaĵo... La oficiala versio estas plene senkongrua historio.

**Kaj cele klarigi la faktojn, aperis internacia movado stimuliganta sendependan traserĉadon...**

La movado mem estas plene malcentrigita. Estas pluraj grupoj postulantaj sendependan esploradon. Estas miloj da homoj tra la tuta mondo, kiuj jam faris sian taskon kaj ili vidas kiel ĉiutage oni pravigas liberolimigojn kaj arbitrajn militojn surbaze de la fablo pri la 11-S. Ĉar la amasinformiloj ne nur ne informas pri la mankoj de la oficiala versio, sed ili ankaŭ demonigas ajnan, kritikanta ĝin, ni estas devigitaj informi rekte la civitanaron.

**En la fatraso de la teorioj pri la konspiro ankaŭ estas disdonitaj iuj neverŝajnaj versioj...**

Konspiro estas, kiam du aŭ plu homoj paktas por plenumi krimon. Fakte estas iu el la plej kondamnitaj akuzaĵoj. La oficiala versio estas versio pri konspiro, ĉar alportas neniun pruvon pri tio, ke la supozataj araboj estu kulpaj. Kiel en ĉiu alia esploro oni devas serĉi la probablajn faktojn. Estas akredigitaj homoj, kiu esploris tion, kaj iliaj rezultoj estas atingeblaj ĉe la retejo. Kion mi povas aserti estas, ke la oficiala versio frakaziĝas okulfrape kaj ke nepras sendependa esploro iranta ĝis kie ajn bezonus.



# La tekstoj


- «Editorial: ¿Crisis...? ¿De qué crisis hablamos?», *Rojo y Negro* 2008(216)3. http://www.rojoynegro.info
- KARBALA, David: «Qui són els bons? El Caucàs. Les raons del conflicte geoestratègic que ha centrat l'estiu mediàtic.», *La Directa* 2008(105)18-19. http://www.setmanaridirecta.info
- JUÁREZ, Pep: «Corbacho y la inmigración», *Rebelión* http://www.rebelion.org
- PASCUAL, José: «Marruecos», *Materiales Internacionales 2008(6)3* http://www.cgt.org.es/spip.php?rubrique110
- CHOMSKY, Noam: «Allò que fa convencionals els mèdia no convencionals», *Catalunya* 2008(100)28-30. http://www.revistacatalunya.cat
- GARCÍA, Gemma: «La versió oficial és una història sense cap consistència», *La Directa* 2008(105). http://www.setmanaridirecta.info


Esperantigis Jurgo Alkasaro


creative commons

**Vi rajtas:**

- **dividi** – kopii, distribui kaj transdoni la verkon
- **remiksi** -- adapti la verkon

Laŭ jenaj kondiĉoj:

- **Atribuo**. Vi devas atribui la verkon tiel kiel specifis la aŭtoro aŭ la permesil-posedanto (sed ne en maniero kiu implicas ke ili subtenas vin aŭ vian verkon).
- **Nekomerca**. Vi ne rajtas uzi tiun ĉi verkon por komercaj celoj.
- **Distribui kun sama permesilo**. Se vi ŝanĝas, adaptas, aŭ faras ion, kio baziĝas sur tiu ĉi verko, vi rajtas distribui la rezultan verkon nur kun permesilo identa aŭ simila al tiu ĉi.
- Por iu ajn reuzo aŭ distribuo, vi devas klarigi al aliaj la permesilon de tiu ĉi verko.
- Ajna el tiuj ĉi kondiĉoj povas esti nuligita se vi ekhavas permeson de la kopirajto-posedanto.
- Nenio en tiu ĉi permesilo endanĝerigu aŭ limigu la moralajn rajtojn de la aŭtoro.